

## Kastorkapto

**C**erte estis la kulpo de la fermiteco de mia ,ĉambro‘, ke la dormo prenis min en siajn brakojn iom pli firme ol kutime; ĉar mi ne jam estis leviĝinta, kiam mi estis vekata per laŭta voĉo.

„*Pooh, Sir*, mi kredas, ke vi ne jam finigis Vian mezuradon de la kovrotukoj. Streĉiĝu iomete plu, sed ne laŭlonge, sed alten. Tio bonos, se mi n’eraras, hihihih!“

Mi ekrektiĝis kaj vidis al la ĝenanto, kiu staris en la malfermita felpordo. Estis Sam Hawkens. Hieraŭ li estis provizita nur per pafilo, hodiaŭ li portis la kompletan *trapper*:an ekipaĵon. Li ŝajne jam estis atendinta min, pruvo, ke li volis akompani nin.

„Mi tuj pretos, kara Sam.“

„M’esperas. La malgranda *Sir*, mi pensas, jam staras je la *hole*.“

„Ĉu Vi kuniras al la Bee Fork?“

„Ŝajnas tiel, se mi n’eraras. La malgranda *Sir* ja ne povas porti la ilaron tute sole.“

Paŝante antaŭ la pordon, mi rimarkis Harry:n, kiu atendis min je la eniro de la kanjono. Sam prenis kelkajn kunligitajn kaptilojn, svingis ilin sur sian ŝultron kaj paŝis al la eliro.

„Ĉu ni lasos la ĉevalojn tie ĉi?“ mi demandis.

„M’ne kredas, ke Via besto lernis kiel pretigi laŭregulan feraĵon, aŭ suprenkapti dikvostulon de la fundo de rivero. Ni disigu la krurojn, se ni volas esti finigintaj je la ĝusta tempo. Do venu!“

„Sed mi unue iru al mia ĉevalo, kara Sam.“

„Ne necesas. La malgranda *Sir* jam faris ĉion, se mi n’eraras.“

Senke li sciis ĝin, li diris ion ĝojigan al mi per tio. Harry do en la matena krepusko estis zorginta pri Hatatitla. Supozeble lia patro estis rakontinta pri mi, kaj tiel kaŭzis la

komencon de lia opiniŝanĝo. Mi ĵus volis miriĝi, ke li, la atentemulo, ne jam estis videbla, sed tiam li venis kun Winnetou kaj unu el la ĉasistoj irante tra la rivero.

Winnetou faris sian indianan saluton al Harry:

„La filo de Ribanna estas forte kiel la militistoj de la bordo de la Gila. Lia okulo vidu multajn kastorojn, kaj lia mano ne kapablu porti la pezon de la feloj.“

Kaj rimarkante la vidon, kiun mi faris tra la valo, serĉante mian Hatatitla:n, li diris trankvilige: „Mia frato Ŝarlih iru pacanime. Winnetou zorgos pri la ĉevalo, kiu ankaŭ estas amata de la apaĉo.“

Post ni estis paŝintaj tra la kanjono, ni turniĝis kontraŭ la direkto, el kiu ni estis venintaj maldekstren, kaj sekvis la fluon de la akvo, ĝis ni atingis la lokon, kie ĝi fluis en la Mankizita:n.

Densa, preskaŭ netrairebla arbustaĵo kovris la bordon de la rivero. Volvkreskaĵoj de ampelopso kreskis alten laŭ dense starantaj trunketoj, de branĉo al branĉo, malaltiĝis, fikse interalligite malsupren, realiĝis alten laŭ la neksta arbo kaj tiel formigis ĥaosajon, en kiu oni kapablis iri nur per helpo de la tranĉilo.

Sam, la malgrandulo, ĉiam estis irinta antaŭ ni. Lia plensarĝita figuro ege memorigis min pri la slovakaj komercistoj de muskaptiloj, kiuj de tempo al tempo estis videblaj transe en mia paceca Erzgebirge:a hejmurbeta. Kvankam neniuj malamikaj kreaĵoj estas ekspekteble en la proksimo, lia grandŝuita piedo evitis per enviiga vigleco ĉiun punkton, en kiu povis esti enprimata spuro, kaj la malgrandaj moviĝemaj okuletoj senĉese migris foje dekstren, foje maldeskstren tra la plena plantokreskaĵoj, kiu povis konkuri je abundeco kun la virgulina tero de la Mississipi:a valo.

Nun la *trapper* levis kelkajn volvobranĉojn alten, kliniĝis kaj trarampis sub ilin.

„Venu, *Sir!*“ Harry postulis al mi. „Ĉi tie deiĝas nia kastorvojo.“

Vere malantaŭ la verda kurteno iris mallarĝa, libera lineo tra la densaĵo, kaj ni trarampis, ĉirkaŭ en la sama direkto kun la rivero, sufiĉe longan tempon inter la arba kaj arbeda ĥaosajoj, ĝis Sam post duone grumbra, duone fajfa sono, kiu estis veninta de la akvo, ekhaltis, turniĝis al ni kaj metis la manon al la buŝo:

„Jen ni estas“, Harry flustris, „kaj la garduloj rimarkis ion.“

Post momento, en kiu ĉirkaŭe regis la plej ega silento, ni plurampis antaŭen kaj atingis kurbon de la rivero, kiu donis la ŝancon al ni vidi sufiĉe grandan kastoran loĝejon.

Mallarĝa, al gardiĝa homo nur ĵuse laŭirebla baraĵo estis konstruita ĝis fore en la akvon, kaj ĝiaj kvarpiedaj loĝantoj vigle estis laborantaj fortikigi kaj pligrandigi ĝin. Transe je la alia bordo mi vidis nombron da la diligentaj bestoj okupiĝintaj murdeti en maldikajn arbotrunketojn per iliaj akraj dentoj, tielke ili devis fali en la akvon. Aliaj okupiĝis per la transportado de arbopecoj, kiujn ili ŝovis naĝante antaŭ ili, kaj kromaj glukovris la konstruaĵon per dika tero, kiun ili alportis de la bordo, kaj kaj fiksigis ilin per la helpo de la piedoj kaj la vasta, kiel trulo uzata vosto al la arbo- kaj arbedaĵaro.

Atente mi rigardis la laboradon de la agema popolo, kaj estis koncentriginta mian vidon al eksternorme granda besto, kiu sidis en atenta pozo sur la baraĵo, kaj laŭ ĉia ŝajno estis garda postenulo. Jen subite la dika ulo rektigis la mallongajn orelojn, faris duonan turniĝon, elpuŝis la menciitan avertsonon kaj estis malaperinta en la neksta

momento en la akvo.

Tuj la aliaj kastoroj sekvis ĝin, kaj estis drole vidi, kiel ili dum la enakviĝo eke rektigis ilian supran korpon, kaj donis egan baton sur la supraĵo per la plata vosto, tielke ĝi sonis laŭte, kaj la akvo ŝprucegis alten.

Certe nun ne estis la tempo sin doni al ŝerceca spektado; ĉar tiu neekspektita ĝeno povis esti kaŭzita nur de proksimiĝo de malamikeca kreaĵo, kaj la plej ega malamiko de tiuj bestoj estas — la homo.

Ankoraŭ la lasta kastoro ne estis malaperinta sub la akvosupraĵo, kiam ni, la armilo en la mano, jam kuŝis sub la profunde pendantaj branĉoj de kelkaj abioj, kaj streĉe ekspektis la alvenon de la ĝeninto. Ĝi ne daŭris longe, kiam la pintoj de la kanaro kelkan distancon laŭflue ekmoviĝis, kaj nur mallongan momenton poste ni vidis du indianojn kaŝiri laŭ la rivero. Unu el ili havis plurajn kaptilojn pendi de siaj ŝultroj, la alia portis nombron da feloj. Ambaŭ estis plene armitaj, kaj ni rimarkis per ilia teniĝo, ke ili sciis, ke malamiko estis en la proksimo.

„*Zounds!*“ Sam siblis tra la dentoj. „Tiuĵ fiuloj trovis niajn kaptilojn kaj rikoltis, kion ili ne semis, se mi n’eraras! Atendu, vi fiuloj, mia Liddy diru al vi, kiu posedas la kaptilojn kaj la felojn!“

Li malrapide alŝultrigis la pafilon kaj pafpretigis ĝin. Mi tuj ekkonis la urgĝon, ke ni sub neniuj kondiĉoj devis fari bruon, kaj ekprenis la brakon de la maljuna *trapper*. Estis ponkoj, kaj la ŝminko sur ilia vizaĝo donis certecon al mi, ke ili ne estis ĉasadantaj, sed militantaj. Do ili ne estis sole en la proksimo, kaj ĉiu pafopovis alvoki al ili helpantojn aŭ almenaŭ vengantojn.

„Ne pafu, Sam!“ mi avertis. „Ili elterigis la militakilon kaj certe ne estas duope.“

„Tion mi ankaŭ vidas“, la malgranda pafema viro reflustris. „Certe estas pli bone neigi ilin elkaŝeje...“

„Ĉu la diablo regas Vin, Sam? Pripensu, kio okazos, se la du esploristoj ne revenos al iliaj kunuloj! La ruĝuloj ekzamenos la ĉirkaŭaĵon detale, kaj finfine ektronus la citadelon de Old Firehand!“

„Vi pravas, *Sir*“, Sam grumblis nekontente. „Sed mi ne ŝate lasas la bubojn forkuri. Kvar el niaj plej bonaj kaptiloj! Ĉiu kostas tri kaj duonan dolaron. Ĝojus min, se ili devus eldoni ne nur la ŝtelitajn, sed ankaŭ iliajn proprajn felojn!“

„Ni ne ludu pri nia sekureco. Se la ruĝuloj ne trovis spuron, ni devas lasi ilin foriri.“

La du indianoj nun staris, turniĝinte de ni ĵus antaŭ ni kaj interfluŝtrante serĉis premsignojn de piedoj. Sensone mi ŝoviĝis antaŭen, pro rigardi ilin pli detale, kaj, se eble, kompreni kelkajn de iliaj vortoj.

La tuta konduto de la du ponkoj montris, ke ili ne certis, en kiun direkton ili serĉu plu. La kaptiloj estis malkaŝintaj al ili, ke ĉasistoj estis ie en la proksimo. Sed la ruĝuloj verŝajne ne trovis iajn indikojn. Nun ili gardiĝe kaŝiris plu, en direkton, kiu igis ilin el la proksimo de la ‚citadelo‘. Do intertempe estis neniu danĝero plu.

Kiam la esploristoj estis ekster aŭdodistanco, Sam liberigis sian koleron.

„Nun la belaj feloj iris for de ni! Ĝi vere jukis en miaj fingroj pafi al ili, se mi n’eraras. Mi pli ŝate estus havinta la du skalpojn ol la plej fajnan dikvostulon!“

„Vi scias, kion mi pensas pri la skalpado. Ege miras min, ke Vi volas okupiĝi per ĝi.“

„Tio havas sian bonan kaŭzon, *Sir*. Mi travivis multan malbonon kun la ruĝuloj, kaj devis peniĝi en maniero, ke mi ne devus koni indulgon. Jen vidu!“

Sam ŝiris la malgajecan feltajon de la kapo, kaj kune kun tiu detiris la perukon. Mi jam konis la aspekton, la senharan, sangoruĝan kranion.

„Kion Vi diras pri tio, *Sir*, se mi n’eraras?“ li prezentiĝis per graveco, kvazaŭ mi neniam antaŭe estus aŭdinta tiun rakontaĵon el lia buŝo. „Mi surhavis mian haŭton ekde infanaĝo honeste kaj kun plena rajto, kaj neniuj *lawyer* aŭdacis diskutadi kun mi pri ĝi, ĝis unu aŭ du dek Panioj venis sur min kaj prenis miajn harojn. Mi tiam iris al Tekama kaj tie aĉetis novan haŭton. Estis nomata peruko, kaj kostis tri dikajn faskojn da kastorofeloj, mi pensas. Sed ne damaĝas; ĉar la nova haŭto estas intertempe pli utila ol la malnova, aparte en la somero. M’povas depreni ĝin, se estiĝas tro malvarme al mi, hihihih!“

Dum tiuj vortoj li estis remetinta ĉapelon kaj perukon sur la kapon. Tute ne estis tempo pro tiaj memoroj kaj longaj paroladoj, ĉar malantaŭ ĉiu arbo povis susuri la ŝnuro de arko aŭ klaki la ĉano de pafilo. Antaŭ ĉio necesis averti la restejon kaj atentigi la ĉasistojn de Old Firehand pri la proksimo de la indianoj. Tial mi postulis al Hawkens:

„Ni nun devas agi, Sam, aŭ la ponkoj estas tie ĉi antaŭ ni komprenas tion. La plej grava aĵo estas averti Old Firehand:on kaj la aliajn. Krome ŝajnas al mi fareda serĉi la ĉefgrupon de la ruĝuloj, pro ekkoni ilian ekzaktan fortecon kaj pretigi niajn rimedojn laŭ tio.“

„Vi pravas, *Sir*!“ Sam kapjesis. „Tio farendas, se mi n’eraras! Mi vetas miajn *mokassin*:ojn pro paro da baletŝuoj, ke tie ĉi estos multaj ruĝaj viroj pli post mallonga tempo. Do Vi kun la malgranda *Sir* iru en la citadelon kaj avertu niajn homojn, dum mi sekvas la spuron de la *indsmen*:oj reen, pro ekkoni iom pli, ol la du ruĝuloj diris al ni.“

„Ĉu ne pli bone iru Vi al la patro, Sam Hawkens?“ Harry demandis. „Vi pli bone kapablas trakti la kaptulojn, kaj kvar okuloj vidas pli ol du.“

„Hm! Se *master* Harry ne volas ĝin esti alimaniere, mi do agu laŭ lia volo, se mi n’eraras. Sed se la bastono naĝos alidirekte kiel dezirita, ĝi ne estos mia kulpo.“

„Ĝi ne estu Via, maljunulo“, la knabo certigis. „Vi ja scias, ke mi ŝate agas memfare. Venu, *Sir*!“

Harry lasis la malgrandan *trapper*:on stari kie li estis, kaj ekiris plu antaŭen tra la densaĵo. Mi sekvis lin.

Kvankam la cirkonstancoj necesigis, ke mi koncentrigis mian plenan atenton al la ĉirkaŭo, mi ne povis eviti rigardi la konduton de la knabo, kiu rapide iris per la lerteco de sperta arbarmigristo sensone tra la densaĵo, kaj en ĉiu el iliaj moviĝoj montriĝis aspekton de plej alta gardiĝo.

Ne eblis io alia, li certege jam estis kutimiĝinta ekde infanaĝo al la vivo en la ĉasolando, certe havis impresojn, kiuj akriĝis liajn sensojn, certigis liajn sentojn, kaj donis al la daŭrado de lia sorto nekutiman direkton.

Certe preskaŭ horon ni senĉese estis antaŭeniĝintaj, kiam ni atingis duan kastoran baraĵon, kies enloĝantoj sed ne estas videblaj ekster ilia konstruaĵo.

„Ĉi tie ni estis metintaj la kaptilojn, kiujn ni antaŭe vidis ĉe la ruĝuloj, *Sir*, kaj plie fore estas la Bee Fork, kien ni fakte volis iri. Sed certe ĝi nun estos alimaniere; ĉar vidu, la spuro iras al la arbaro el kiu ili venis. Ni sekvu ĝin.“

Li ĵus estis ekiranta plu, kiam mi retenis lin.

„Harry!“

La knabo vidis al mi demande.

„Ĉu Vi ne pli ŝate volas reeniri kaj lasi la kroman al mi?“ mi demandis.

„Kiel Vi ekhavis tian penson?“

„Ĉu Vi konas la danĝerojn, kiuj eble atendas nin tie antaŭe?“

„Kial mi ne konu ilin? Ili neeble povas esti pli grandaj ol tiuj, al kiuj mi rezistis, kaj kiujn mi travivis.“

„Mi volas, ke Vi vivu plu!“ mi petis.

„Mi volas vivi, kaj mi vivos. Aŭ ĉu Vi kredas, ke la aspekto de multkolora ŝminkita viro povas timigi min?“

Ni antaŭeniĝis plu. Ni nun malproksimiĝis de la rivero kaj paŝis inter la maldikaj kaj maldensaj trunkoj de la altarbaro, kiu havis densan verdan folitegmenton super la per humida musko kovrita tero, en kiu la premsignoj estis klare videblaj.

Subite Harry, kiu ankoraŭ iris antaŭ mi, ekhaltis. Nun videblis la premsignoj de kvar viroj, kiuj estis irintaj kune, kaj disiĝintaj tie ĉi. La du, kiujn ni estis vidintaj, estis kunhavintaj ĉiujn militajn armilojn. Ĉar mi nun supozis, ke tie ĉi estis pli granda nombro da iliaj samtribanoj, kiu estis kunigitaj nur pro la grava entrepreno iri tian longan vojon tra la regiono de malamikecaj triboj, mi nun ekhavis la ideon, ke tiu entrepreno povus rilati al la malebligita atako al la fortikaĵo. Boneble tio estis unu el tiuj vengaj eliroj, dum kiuj la indianoj efikiĝas ĉion pro kvitigi malvenkon aŭ perdon.

„Kion ni faru?“ Harry demandis. „Tiu nova spuro kondukas en la direkton al nia ‚citadelo‘, kiun ni ne devas meti en la danĝeron esti trovata. Ĉu ni sekvu ĝin, aŭ ĉu ni disiĝu, *Sir*?“

„Kaj tiu kvaropa spuro ĉiukaze kondukas al la restejo de la ruĝhaŭtuloj, kiuj unue teniĝas kaŝite kaj atendas la revenon de iliaj esploristoj. Antaŭ ĉio ni serĉu la ĉefgrupon, pro ricevi certecon pri la nombro kaj intenco de la malamikoj. La eniro de nia kavalira kastelo ja estas gardata de postenulo, kiu certe plenumos sian taskon plukaŝi nian sekreton.“

„Vi pravas. Ni iru antaŭen!“

La arbaro estis en sufiĉa distanco de la altaĵo, al kiu supreniĝis la rivero sur la ebenaĵon, kaj estis krutitaj de profundaj, rokaj kanaletoj, en kiuj abunde kreskis filikaĵoj kaj sovaĝaj berokreskaĵoj. Ni ĵus estis proksimiĝantaj al unu el tiuj profundaĵoj, kiam mi rimarkis brulan odoron, kaj tial provis ekzameni la arbaran areon per pli detala vido, ĝis mi ekvidis maldensan, mallarĝan fumkolonon, kiu, ofte interrompita aŭ ankaŭ tute malaperinte supreniĝis alten al la arbopintoj rekte antaŭ ni per ludumaj moviĝoj.

Tiu fumo povis nur veni de indiana fajro.

Mi retenis Harry:n kaj atentigis lin pri mia ekstrovo.

„Igu Vin malantaŭ tiun arbedaĵon, mi venos vidi al tiuj homoj!“

„Kial ne ankaŭ mi?“

„Unu sufiĉas. Duope la danĝero esti ekvidata estas duoble grande.“

Li konsente kapjesis kaj paŝis, gardiĝe forviŝante ĉiun spuron flanken, dum mi, serĉante kovron kaŝiris de trunko al trunko al la kanaletoj.

Sur ties bazo sidis aŭ kuŝis dense amasiĝite tia alta nombro da ruĝhaŭtuloj, ke la profundaĵo preskaŭ ne povis enteni ilin ĉiujn. Malsupre je la elirejo staris senmove kiel fera kolono juna, longhara militisto, kaj ankaŭ je tiu ĉi kaj la alia flanko sur la rando mi ekvidis gardistojn, kiuj feliĉe ne estis rimarkintaj mian venon.

Mi provis nombri la restantojn, kaj tial vidis al ĉiu el ili per la okulo, sed baldaŭ ekĉesis mirigite. Plej proksime al la fajro sidis — ĉu tio do vere estis eble? — la blanka ĉefo Parranoh aŭ Tom Finnetey, kiel li estis nomita de Old Firehand. Mi estis vidinta lian vizaĝon je la mateno de la batalo ĉe la Fort Niobrara tro klare, ke mi hodiaŭ ne povis erari. Kaj tamen mi preskaŭ frenezigiĝis pri mi mem; ĉar de lia kapo pendis la plej bela skalpobuklo, kvankam Winnetou ja estis preninta ĝin de li, kaj ekde tiam ne eliĝis de sia zono nur unu minuton. Ĉu la fiulo do vere estis restariĝinta el la mortuloj?

Tiam la gardisto, kiu staris sur mia flanko de la valo, ekmoviĝis al la loko, kie mi kuŝis, kaŝite de roko, kaj mi tial devis rapide foriĝi reen.

Post mi feliĉe revenis al Harry, mi mansignis al li sekvi min, kaj nun paŝis reen laŭ nia vojo ĝis al la loko, kie la spuroj disiĝis. Ekde tie ni sekvis la novan spuron, kiu iris tra la densa kreskaĵaro ĉiam rekte al la valo, tra kiu ni estis veninta hieraŭ, kaj en kie ni estis alvokitaj de Sam Hawkens.

Nun klaris al mi, ke la ponkoj estis plifortiĝintaj, kaj tiam sekvintaj ĉiujn niajn paŝojn, pro veniĝi pri ni. Nia restado dum la resaniĝo de Old Firehand estis doninta al ili sufiĉan tempon kunigi ĉiujn haveblajn fortojn. Sed kial tia alta nombro da batal-emaj militistoj nur pro ni tri, tion mi ne povis kompreni, se mi ne volis supozi, ke Parranoh konis la ĉasistojn kaŝejon, kaj ke liaj intencoj celis al ĉiuj ĝiaj membroj.

La du ruĝaj esploristoj faris bonan vojon al ni, kial ni relative rapide antaŭeniĝis. Ni tutcerte ne plu estis malproksime al la kruciĝa valo, kiu iris al nia direkto, kiam mi ekaŭdis mallaŭtan tinteton, kiu venis el densa arbedo.

Per manmovo mi signis al Harry kaŝiĝi, tiam mi ekkusiĝis sur la teron kaj rampis laŭ kromvojo al la menciita direkto. La neksta, al tiu loko ne origine apartenanta aĵo, kiun mi vidis, estis aro de feraj kastorokaptiloj, kaj flanke de ĝi videbliĝis du kurbaj kruretoj, kies piedoj estis en grandegaj botoj. Plurampante tien, mi rimarkis longan, vastan ĉas-veston, sur kies supra parto estis la larĝa, fendetohava randaĵo de pratempa feltoĉapelo, kaj kelkan distancon for de tiu randaĵo mi vidis la rektajn, dornece deigiĝantaj pintoj de taŭzita barbo.

Estis Sam, la malgrandulo. Sed kiel li nur venis tien ĉi, dum mi ja supozis, ke li estus delonge en la ‚citadelo‘? Tio ĉiukaze estis facile eksciebla. Mi ja nur bezonis demandi lin. Kaj dum mi tial rampis sensone al li laŭeble rapide, la ekteruro, kiun li certe estis havonta pro la neekspektita ataketo, jam antaŭe plezurigis min.

Mallaŭte, tute mallaŭte mi prenis la pafilon, kiu kuŝis je lia flanko, kaj tiris la malnovan, antaŭdiluvan Liddy:n al mi, kaj malfermis ĝian rustokovritan ĉanon. Per la

kraketo de la ĉano Sam terurigite ekmoviĝis tiel rapide, ke la branĉetoj supre de li deŝiris lian ĉapelon kaj perukon, kaj kiam li vidis sian propran pafilon celante al li, supre de lia en ĉiuj koloroj de la pluvarko brilanta papageca nazo videbliĝis grandega truo, kiu ĉiam pli vastiĝis per miro.

„Sam Hawkens“, mi flustris, „se Vi ne baldaŭ fermos Vian buŝon, mi enŝovos la kompletan aron da kaptiloj, kiu kuŝas tie.“

„*Good luck*, kian ektimon Vi kaŭzis al mi, *Sir*, se mi n’eraras!“ balbutis la *trapper*, kiu malgraŭ sia timiĝo estis kaŭzinta ne unu malgardiĝan sonon, kaj rapide rekondukis ĉapelon kaj perukon al ilia perdita laŭdeca loĝejo. „La kukolo Vinprenu! Mi ĝin sentis en ĉiuj miaj membroj, se mi n’eraras, ĉar se Vi estus estinta ruĝhaŭtulo, mi —“

„— Vi certe estus finmangiinta Vian lastan urspiedaĵon“, mi kompletigis. „Jen Vi havas Vian krakilon! Kaj nun diru, kio okazis, ke Vi kuŝiĝis tien ĉi pro dormi.“

„Ĉu dormi? Nu, oni ne povas paroli pri dormi, eĉ kiam Vi povis proksimiĝi al mia korpo, senke mi rimarkis ĝin. Mi ja havis miajn tri pensojn okupitajn pri la nur du rato-feloj, kiujn mi antaŭe volis kunpreni, kaj ja ne necesas rakonti al la aliaj tie en la valo, ke la maljuna Sam estis surprize prenita.“

„Mi silentos“, mi asertis.

„Kie Vi lasis *master* Harry:n?“ Sam demandis post tio.

„Li staras tie transe. Ni aŭdis Viajn kaptilon tinteti, kaj mi devis scii, kiuj sonoriloj tiuj estis.“

„Ĉu sonoriloj? Ĉu estis tiel laŭte? Sam Hawkens, kia stulta lavurso vi estas! La maljuna mulo tie kuŝas pro kapti skalpojn, kaj faras bruegon kiu ankoraŭ aŭdeblas en Kanado, se mi n’eraras! Sed kion pelis Vin en mian direkton? Vi sekvas la du ruĝhaŭtulojn, ĉu?“

Mi jesis al tiu demando kaj rakontis al li, kion mi estis esplorinta.

„Hm, tio kostos pulvon, multe da pulvo, *Sir*!“ li komentis. „M’venis kun miaj kaptiloj tie laŭ la akvo kaj subite vidis du ruĝulojn, se mi n’eraras, rekte tie je la rando de la arbedo, apenaŭ ok paŝojn for de mi. Mi tuj kliniĝis en la arbedaĵon kaj nun rimarkis, ke unu iris supren, la alia malsupren, pro esplori la valon. Sed tio estos lia malfeliĉo, mi taksas. Mi lasis unu pasi preter mi, kaj tiam iĝis tien ĉi, pro poste, kiam ili rekuniĝus, demandi la du fiulojn kion ili vidis. Se Vi volas helpi al mi, iĝu transen al la alia flanko, proke ni havis ilin inter ni!“

„Aŭskultu, Sam! Nur tiu el la du povus estiĝi danĝero al la citadelo, kiu iris dekstren de tie ĉi. Kaj se tiu ne estis rimarkinta ion, ni ankaŭ lasu tiujn du ponkojn foriri sub ĉiuj kondiĉoj. Ni bezonas tempon pro pretigi nian defendaĵojn, kaj tiun ni povas nur sukcesi, kiam ni ne lasos nin videbliĝi antaŭ la malamikoj.“

„Jes, jes, bone, *Sir*. Iam la danco ja malgraŭ ĉio komencos, kaj tiam ni frapos sur la fingrojn de la fiuloj laŭdece, se mi n’eraras! Kaj nun ne lasu la malgrandan *Sir*:on atendi plu. Alikaze li povus fari ian stultaĵon per nura senpacienco.“

Mi obeis al tiu ordono kaj reeniris al Harry. Post mi estis raportintaj al li per koncizaj vortoj, ni iĝis en postenon vidalvide al Sam, kaj ni atendis la revenon de la du ruĝhaŭtuloj.

Nia pacienco estis longe streĉata, kaj kelkaj horoj pasis, ĝis ni aŭdis la paŝadon de kaŝire venanta homo. Estis unu el la atenditoj, maljuna, per vetero dezegnita militisto, kiu estis ne havinta sufiĉan spacon por la akiritaj skalpoj en la zono, tial li uzis la dikajn tavolojn de la haroj de liaj venkitaj malamikoj sur la eksteraj juntoj de lia pantalono kiel franĝoj.

La ruĝuloj paŝadis tiel senzorge, ke li certe ne estis eltrovinta ion pri nia ĉeesto aŭ pri la ‚citadelo‘. Mi senŝarĝite elspiris, ĉar tiel oni povis eviti nenecesan sangoverŝon, kaj eĉ ankoraŭ estis la espero, ke la ‚citadelo‘ plu restis estonte netrovite.

La paŝoj de la maljuna indiano jam ne sonis plu, kiam ankaŭ la alia venis de la alia, nedanĝera flanko, kaj same iris en la direkton, el kiu mi antaŭe estis veninta kun Harry. Ni ankoraŭ atendis kelkan tempon, kaj tiam kune reeniris al la ‚citadelo‘ laŭ la sama vojo.

Antaŭ la pordego ni serĉis la postenulon, kiu estis kuŝinta malantaŭ la kovran arbedon, kaj certe estis rimarkinta la ruĝulon, kiu estis pasinta en la distanco de nur kelkaj paŝoj. Estis Will Parker.

Sam vidis al li mirigite.

„Vi ĉiutempe estis *greenborn*, Will, kaj vi ĉiam restos esti *greenborn*, ĝis la *redman*:oj ekprenos vin je la skalpo, se mi n’eraras. Vi certe kredis, ke la ruĝulo ĉirkaŭiris tie pro kapti formikojn, ke vi lasis la feraĵon en la ingo, ĉu?“

„Sam Hawkens, metu la bridon sur vian langon, aŭ mi faros al vi, kion mi ne faris antaŭe al la ruĝulo!“ la primokito grumblis. „Will Parker estu *greenborn*! La ŝerco certe valorus kelkan pafopolvo, olda *coon*. Sed la filo de via patrino do verŝajne ne estas sufiĉe inteligenta kompreni, ke oni ĉiam lasas esploriston foriri, pro ne atentigi la aliajn, ĉu?“

„Vi certe pravas, kara Will, sed nur, kiam vi ne volas akiri indianfelojn, hihihih!“

Dum tiuj vortoj Sam iris al la akvo, sed antaŭ li malaperis inter la rokoj, li foje turniĝis reen kaj avertis la gardanton:

„Malfermu viajn okulojn! Tie transe en la *gutter* estas plena nesto de saguloj. Ili ankaŭ povus ekemi meti iliajn nazojn inter viajn krurojn. Vere estus domaĝe pri vi, se mi n’eraras, ege domaĝege!“

Alte kovrita sub lia aro de kaptiloj li paŝis antaŭ ni, kaj baldaŭ ni staris en la elirejon de la kanjono, kaj povis bone vidi trans la tuta valbazo. Akra fajfo de la maljuna *trapper* sufiĉis pro alvoki ĉiujn enloĝantojn de la valo, kaj per altigita atento ĉiuj aŭskultis la rakontadon de nia aventuro.

Old Firehand silente aŭdis la raporton. Sed kiam mi parolis pri Parranoh, elpuŝiĝis el li voko de miriĝo, kaj samtempe de ĝojo.

„Ĉu estus eble, ke Vi ne eraris, *Sir*? Tiukaze mi povus malgraŭ ĉio plenumi mian ĵuron kaj preni la fiulon inter miaj pugnoj, kio estis jarojn longe mia plej arda deziro.“

„Ja nur la haroj frenezigis min.“

„Ho, tiuj egalas! Sam Hawkens estu ekzemplo al Vi, kaj ĉio ŝajnas, kvazaŭ Vi ne trafis lin ĝuste tiam en la matena krepusko. Liaj anoj trovis kaj kunprenis lin. Dum li estis malsane, li resaniĝis, kaj lasis rigardadi nin, kaj nun sekvis nin.“

„Sed kial li ne atakis nin?“

„Mi ne scias; tio certe havas kaŭzon, kion ni iam ekkonos poste. Ĉu Vi lacas, *Sir*?“

„Mi ne povus aserti tion.“

„Mi devas vidi la viron mem. Ĉu Vi volas akompani min?“

„Memkompreneble. Mi nur atentigu Vin pri la danĝeroj de tiu ago. La indianoj eble denove elsendos esploristojn. Ni iĝos inter la serĉantojn, kaj eble ne povos reatingi niajn kunulojn.“

„Ĉi ĉio certe eblas. Sed mi neeble povas resti kaj atendi pacience ĝis ili trovas nin. — Dick Stone!“

La vokito estis forestinta hieraŭ pro ‚fari viandon‘, do vidis min nur nun. Li alvenis, salutis min elkore, kaj tiam estis demandata de Old Firehand:

„Ĉu Vi aŭdis, kien ni iros?“

„M’pensas, ke jes.“

„Alportu Vian pafilon! Ni ekzamenos ruĝhaŭtulojn.“

„Mi kunestas, *Sir*. Ĉu ni rajdos?“

„Ne, ni nur iros al la *gutter*. Sed Vi aliaj movigu Viajn manojn, kaj kovru la *cache*:ojn per herboj. Oni ne povas scii kio okazos, kaj se la ruĝuloj iĝas inter niajn rokojn, ili almenaŭ ne trovu ion, kio povus esti utile al ili. Harry, Vi iru al Will Parker, kaj Vi, Bill Bulcher, tenadu la ordon dum ni forestas!“

„Patro, lasu min esti ĉe vi!“ Harry petis.

„Vi ne povos esti utile al mi, *my boy*. Ripozu! Vi certe renkontiĝos kun la malamiko iam poste.“

Harry ripetis sian peton, sed Old Firehand tenadis sian ordonon, kaj tiel ni trio pe ree elpaŝis tra la riveringo.

Ekstere ni iris, post kelkaj koncizaj ordonoj al la postenulo, al la loko, kie Sam Hawkens estis kaŝiĝinta. La direkton de tie al la valo estis ĉiukaze plej avantaĝe al ni, ĉar ni estis ŝirmitaj je ambaŭ flankoj.

Winnetou ankaŭ estis forlasinta la restejon mallonge post nia ekiro je la mateno, kaj ne jam estis reveninta. Li nun estus estinta la plej taŭga akompananto al ni, kaj mi ne povis eviti iomete afliktiĝi pri li. Estis ja boneble, ke la malamikoj estis trovintaj lin.

Mi ĵus pensis pri tio, kiam subite la arbedaĵo flanke de ni estis disigata, kaj la apaĉo staris antaŭ ni. Niaj manoj, kiuj estis etendiĝintaj je la unua kraketo de la branĉoj al la armiloj nun deĝis de la zonoj, kiam ni ekvidis lin.

„Winnetou iros kun la blankaj viroj pro rigardi Parranoh:n kaj la ponkon“, li diris.

Mirigite ni vidis al li. Li do jam sciis pri la ĉeesto de la indianoj.

„Ĉu mia ruĝa frato vidis la militistojn de la plej kruelaj parencoj de la suoj?“

„Winnetou gardu sian fraton Ŝarlih:n kaj la filon de Ribanna. Tial li iradis malantaŭ ilin kaj vidis, kiel ili kaŝiradis al la restejo de la ponkoj. Sed la viraro de Parranoh ankoraŭ estas nemalfortigita, kaj liaj pensoj estas plenaj je malsincereco. Winnetou mortigos la blankan ĉefon de la ponkoj.“

„Ne, la ĉefo de la apaĉoj ne tuŝos lin, sed lasos lin al mi!“ Old Firehand respondis.

„Winnetou donacis lin al sia blanka amiko jam fojon antaŭe!“

„Tiun fojon Parranoh ne povos fuĝi for de mi, ĉar tiun fojon mia mano —“

Nur aŭdeblis tiu lasta vorto de Old Firehand, ĉar en la momento, en kiu ĝi estis dirita, mi ekvidis du ardaĵn okulojn brili malantaŭ la arbedaĵo, kiu kaŝis la disigon de la

spuro. Unu salto, kaj mi estis ekpreninta la viron, kiu estis la posedantoj de la okuloj.

Estis tiu, pri kiu oni estis parolinta: Parranoh. Apenaŭ, ke mi staris antaŭ li, kaj metis miaj fingrojn ĉirkaŭ lia kolo, estis susurado je ambaŭ flankoj, kaŭzata de elsaltantaj indianoj, kiuj volis ekhelpi al ilia ĉefo.

La amikoj estis rimarkintaj mian rapidan movon, kaj tuj ŝtormis al la atakantoj. La blanka ĉefo estis sub mi. Miaj genuoj sur lia brusto, la fingroj de mia maldekstra mano ĉirkaŭ lia kolo kaj la dekstra ĉirkaŭ lia mano, kiu estis ekpreninta la tranĉilon, tiel mi tenis lin sube. Li kurbiĝis sub mi kaj faris la plej kolerajn klopodojn puŝiĝi for de mi. Batante ĉirkaŭen per la piedoj kiel katenita taŭro li provis stariĝi per fortegaj ekmovoj. La okuloj sangoruĝe eliĝetis el iliaj ungoj, kaj antaŭ lia buŝo estis la tumulteca ŝaŭmo de la kolerego. Ĝi estis al mi, kvazaŭ mi havis furiozan beston sub mi, kaj per ĉiu forto mi igis miajn fingrojn ĉirkaŭ lia kolo, ĝis li spasme tremiĝis kelkajn tempojn, reenigis la kapon, rulis la okulojn, kaj per ĉiam malfortiĝanta tremo rektigis la membrojn. Parranoh estis venkita.

Nun finfine mi vidis ĉirkaŭen, kaj tio estis aspekto, kian la plumo ne povas priskribi. Per zorgo, ne alvoki helpantojn al la malamikoj, neniu batalanto uzis sian pafilon. Oni estis uzinta nur la tranĉilojn kaj la tomahokojn. Neniu staris rekte, sed ĉiuj kuŝis sur la tero kaj ruliĝis en la propra sango aŭ tiu de la kontraŭulo.

Winnetou ĵus estis okupiĝanta puŝi sian tranĉilon en la bruston de iu, kiu kuŝis sub li; li ne bezonis min. Old Firehand kuŝis sur kontraŭulo kaj provis fortenti alian, kiu pikis en lian brakon. Mi kuris helpi al li, kaj terenbatis la atakanton per sia propra hakilo, kiu estis falinta de li. Tiam mi kuris al Dick Stone, kiu kuŝis inter du mortaj ruĝhaŭtuloj sub grandega viro, kiu plene klopodis fari la mortigan pikon. Li ne sukcesis ĝin; la hakilo de la samtribano ĉesigis lian klopodadon.

Dick stariĝis kaj enordigis siajn membrojn.

„*By Jove, Sir*, tio estis helpo je la ĝusta momento! Tri kontraŭ unu vere estas iomete troa aĵo, kiam oni ne pafu. Mi dankas al Vi!“

Ankaŭ Old Firehand etendis sian manon al mi, kaj ĵus volis ekparoli, kiam lia vido ektrafis Parranoh:n.

„Tim Finn— ĉu tio eblas? La ĉefo mem! Kiu okupiĝis pri li?“

„Old Shatterhand batis lin teren“, Winnetou diris anstataŭ mi. „La Granda Spirito donis al li la forton de la bubalo, kiu plugas la teron per sia korno.“

„Amiko!“ Old Firehand vokis, „mi neniam vidis iun kiel Vin, dum ĉiuj la longaj jaroj de mia migradoj. Sed kiel ĝi eblas, ke Parranoh povis kaŝiĝi tie ĉi kun siaj anoj, kvankam Winnetou estis en la proksimo mallonge antaŭe?“

„La blanka ĉefo ne jam estis kaŝiĝinta tie ĉi je tiu tempo. Li trovis la spuron de siaj malamikoj kaj sekvis ilin sur ilia vojo. Liaj militistoj venos post li, kaj miaj blankaj fratoj sekvu Winnetou:n rapide en la ‚citadelon‘.“

„Li pravas, la ĉefo!“ Dick Stone asertis. „Ni hastu atingi niajn kunulojn.“

„Bone“, Old Firehand respondis, el kies brako la sango fluis larĝe. „Ĉiukaze ni laŭeble forigu la spurojn de la batalado. Iru kelkan distancon antaŭen, Dick, proke ni ne estos surprizigataj denove!“

„Tio okazu, Sir. Sed antaŭ ĉio unue prenu la tranĉilon el mia karno. Mi ne povas bone atingi tiun aĵon per la mano.“

Unu el liaj tri kontraŭuloj estis puŝinta sian tranĉilon en lian flankon, kaj per la interbatalo ĝi estis eniĝinta ĉiam pli profunde. Feliĉe ĝi ne estis en vivdanĝera loko, kaj lasis post la eligo nur malegan vundon, relative al la fera naturo de Stone.

Post mallonga tempo ĉio necesa estis farita, kaj Dick Stone repovis moviĝi.

„Kiel ni nun transportu nian kaptiton?“ Old Firehand demandis.

„Li estu portata“, mi respondis. „Sed Vi havos problemojn, kiam li rekonsciigos.“

„Ĉu portata?“ Stone pluis. „Tio ŝatiĝis neniam al mi dum ĉiuj jaroj, kaj mi ankaŭ ne volas kaŭzi tiun koraflikton al tiu maljuna bubo.“

Per kelkaj tranĉoj li disigis nombron de proksimaj arbotrunketoj de la radiko, prenis la kovrotukon de Parranoh, tranĉe striigis ĝin, kaj tiam diris, ĝojante kapskuante al ni:

„Ni faros tirilon, sledon, glitan lignaĵon aŭ tian aĵon kiel tiuj, fiksligos tiun homidon sur ĝin, kaj tiam forigos kun ĉi ĉio.“

La propono estis akceptata kaj farata, kaj baldaŭ ni ekiris, dum kio ni sed lasis tiel klaran spuron, ke estis granda peno al Winnetou, forviŝi ĝin almenaŭ laŭeble bone.